

Intervjuo kun Olivier Tzaut pri la kampanjo Esperanto en la lernejojn Radioprelego de Claude GACOND, SRI 697, 1977.02.16 & 18 & 19

Cl.- Parolas Claude Gacond. Hodiaŭ mi venis kun sinjoro Olivier Tzaut, kiu nuntempe sekretarias por la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Apud duontempa instruista funkcio, kiun li plenumas en montara lernejo nomata 'Mont Soleil', kio estas 'Sunmonto'. Sinjoro Tzaut, ĉu vi povas rakonti, kiel formiĝis la komitato, kiu estas nuntempe la motoro de la komitato de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'?

OT.- Jes. Ĉirkaŭ 1970 mi kreis kun kolegoj laborgrupon nomitan grupo 'Lernejo kaj vivo' kiu inspiriĝis per la pedagogio de la fame konata franca pedagogo, Célestin Freinet. Dum jaroj ni renkontiĝis regule en diversaj lernejoj por interŝanĝi spertojn, ideojn, pretigi instrumaterialon, kaj tiel plu. Kaj estas el tiu grupo 'Lernejo kaj vivo' ke formiĝis fine la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'.

Cl.- Kiam vi lanĉis tiun ĉi kampanjon, fakte?

OT.- La decido lanĉi ĝin estis prenita en novembro 1974, kaj la tuta afero komenciĝis fakte en februaro 1975. Tiam ni dissendis alvokon al pluraj centoj da personoj, ĉefe el la instrumedio kaj ĉefe el Romandio.

Cl.- Kiel prezentiĝis via unua alvoko sendita do en februaro 1975?

OT.- Unue estis letero, kiu prezentis la problemon de la internacia lingvo ĝenerale kaj la situacion ĉi-rilate en Svislando. Oni anoncis, ke kiel provizora sekretario mi pretas informi en plej diversaj medioj kaj ke ni laboros en kunlaboro kun la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Fine de la letero ni lanĉis alvokon por ke oni subtenu finance nian agadon.

Cl.- Kaj kiom da personoj subskribis la alvokon?

OT.- Kvardek-kvin personoj, ĉefe geinstruistoj ne parolantaj Esperanton, sed favoraj al Esperanto.

Cl.- Do, vi verŝajne prezentis laborprogramon. Kio enestas, resume?

OT.- Jes, kompreneble ! La ĉefaj punktoj estas la jenaj:

1-e: Sistema informado de la instru-instancoj, instruistaro, politikaj instancoj, ĵurnalistoj;

2-e: pretigi dosierojn;

3-e: malfermi kursojn;

4-e: okazigi instru-eksperimenton kies rezultoj estos science mezuritaj kaj disponigi ĉi lastajn;

5-e: proponi instruplanon al la instruministerioj.

Poste, en la sama cirkulero ni anoncis du kursojn de Esperanto proponitaj de la Centro por perfektigo de la instruistaro de la kantono Berno. Tiuj kursoj estis okazontaj en aprilo kaj oktobro 1975. Fine, estis aliĝilo kiu tekstis jene: «Mi subskribinta x devontigas min pagi po x frankojn monate por helpi al la efektivigo de la kampanja programo.»

Cl.- Kaj, ĉu vi ricevis favorajn reagojn?

OT.- Jes. Kaj de du jaroj ni ricevis proksimume 25'000.- svisajn frankojn, kiuj permesis efektiviĝi grandan laboron. Tamen, ne pli ol 120 personoj ĝis nun helpis nin finance. La granda problemo estas, komprenigi al la multnombraj personoj kiuj aprobas nian proponon, ke se ilia simpatio estas grava por ni, ilia financa helpo multe pli utilis. Sed mi ne volas plilongigi la temon, ĉar ĝi estas, mi kredas, sufiĉe konata en la esperantista medio.

Cl.- Ĉu vi atingis interesajn rezultojn?

OT.- Jes, certe! Unu el la plej interesaj estas ke la vorto 'Esperanto' pli kaj pli perdas sian strangecon en la ĝenerala publiko. Multaj gazetoj volonte aperigas artikolojn pri la internacia lingvo, kaj mi diros ion gravan, paranteze: mi tute ne opinias, ke por ke oni akceptu Esperanton kiel pont-lingvon, oni devas ŝanĝi la nomon kaj neniam plu paroli pri 'Esperanto' – vorto, kiu laŭdire ridigus la homojn. Ne la vorto mem ridigas, sed la fakto ke la fenomeno Esperanto estas malbone konata de la ĝenerala publiko. Tuj kiam la publiko regule aŭdas aŭ legas la vorton, tiu lasta perdas sian strangecon, kaj sekve: sian ridindecon. Pro tio mi tute ne konsentas kun tiuj, kiuj nur parolas pri 'planlingvo' aŭ 'internacia lingvo', timante ke la nomo 'Esperanto' forigos la publikon. Mi multe pli timas la mistrafan propagandon de multaj esperantistoj, kaj la fakton ke tro da ili parolaĉas la lingvon. Oni bone memoru, ke plej taŭga argumento ĉiam estas bona scipovo de la lingvo.

Cl.- Vi certe pravas. Sed ni revenu al la atingoj de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Kion vi povas ankoraŭ rakonti?

OT.- De du jaroj, tre ofte en kunlaboro kun sinjoro Claude Piron el Ĝenevo, mi prezentis Esperanton al almenaŭ mil-kvincent gelernantoj el elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj porinstruistaj lernejoj. Krome mi prezentis Esperanton al multaj gekolegoj okaze de kunvenoj. La reagoj estis ĝenerale bonegaj, sed, unu afero estas ŝanĝi sian opinion rilate al la internacia lingvo, kaj tute alia afero estas eklerni la lingvon kaj helpi finance al ĝia disvastigo. Sed mi diras, ke la sinteno rilate al Esperanto daŭre evoluas - kaj tre pozitive.

Cl.- Kaj nuntempe disvolviĝas kursoj en pluraj lernejoj. Sed pri tio ni dediĉos tutan intervjuon venontan semajnon. Kio estas viaj konkludaj vortoj?

OT.- Konklude mi diros, ke la gazetaro, la radio kaj la televido havas pli kaj pli favoran sintenon. Sed, estas grave diri, ke la personaj kontaktoj kun la ĵurnalistoj estas tre efikaj. Unu kondiĉo tamen, ke oni havu kiel eble plej belan dosieron pri la temo. La ĵurnalistoj ja tute ne interesiĝas pri la kredo-konfeso, ili ŝatas firmajn dosierojn. Do, pli bone nenion fari ol iri renkonti ĵurnaliston kun nura kredo-konfeso, aŭ fantazia aserto, kiel 'en la mondo estas 16 milionoj da Esperanto-parolantoj'.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn'. Ĝis reaŭdo! Post tiu intervjuo vi aŭdu kanzonon kantitan de Olivier Tzaut.

OT.- Temas pri meksika kanzono: 'Voĉe de gitaro mia'.
(muziko)